

Stine Andresen,

## Tagmeza trankvilo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Varmegas sub tagmeza sun',  
trankvil' surkampe regas nun;  
alaŭd' ne kantas en aer',  
enherbe songas ĝi sur ter'.<sup>2</sup>

Abel' ne zumas ie ĉi,  
ĉe flor' ne flirtas papili';  
la vent' sub floroj dormas jen,  
perdrikoj kaŭras en la gren'.

Sub poplo ĉe la vojo-rand'  
pro lac' kuŝigis sin migrant';  
la arb', en silka vesto, sin  
ne movas, por ne veki lin.

*Traduko de la Germana poemo "Mittagsstille" de STINE ANDRESEN (geb. Jürgens, \*1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1985-05.*

MR-185-3a / Arg-321-651 (2005-08-26 09:38:44)

*La poetino vivis en Wyk aŭ la norda-frisa inaulo Föhr, estis edzino de muelisto, verkis krom la norda-frisa poemo "Swet hiamelkhaid" precipe poemojn en la germana lingvo.*

---

<sup>2</sup>aŭ:

ne kantas bird' en la aer',  
enherbe songas sur la ter'.